



Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 35^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k129/k129.html>

La koro estas tie, kie materiigas spirito kaj spiritiigas materio (Ibn Arabi)



Hispaneco

N^o 129^a

Oktobron de 2023^a

Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

el la Sudo

Calle Jabonerías, 6.3° D
30010 Murcia
Hispanio

Enhavo

Redaktore: La voĉo de sia mastro.....	3
Nekrologo: A. Kaskero forpasis...	4
Politiko: Tamen diluvo ne venis!.	5
Beletro: Rimarkoj pri Tenorjo....	11
Fulmo neĉesanta.....	14
Malbona negoco.....	15
Literaturo: Defendo de Hispanio.....	17
Kulturo: Hispaneco.....	25

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**

Redaktas: **Jesuo de las Heras.**

Korektas: **Jozefo Pina.**

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties aŭtoroj, ne la redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon, kiun ni trovos interesa.

Kovrilo: Hispaneco estas ĉiuj landoj, kiuj iam estis Hispanio. Aliaj landaroj havas komunan riĉecon, ni havas komunan kulturon.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

Se vi deziras kontribui per aliĝo, kontaktu la redaktoron:
kajeroj@gmail.com

Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon.

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
Scribus, Bluefish, BlueGriffon, Gimp, kaj Yafc.

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.



Redaktore

La voĉo de sia mastro

Estas malfacile verki redaktoran artikolon sufiĉe antaŭe, ĉar hispana politiko evoluas rapide kaj dinamike.

Antaŭ nelonge S-ro Alberto Nunjuez Fejhoo prezentis sian kandidatecon al ofico de Prezidento de Hispanio, sed li ne havis sufiĉe da voĉoj en la hispana parlamento, kiun oni nomas Kortes, kaj nur hodiaŭ oni ekscias, ke la Reĝo de Hispanio prezentas nun la kandidatecon de Pedro Sanĉes, la ĝisnuna Prezidento Funkcianta, por balotado en la ĵusa estonto.

Oni diras, ke li sukcesos ĉifoje, ĉar estas multe da baraktado inter li kaj la sendependismaj partioj, kiel Maldekstro Respublika de Katalunio, Unuiĝintaj por Katalunio, Bildu, Vaska Maldekstro kaj Bloko Naciisma Galega, aldone al SUMAR, kiu vere estas aldono de maldekstraj partioj, ĉefante inter ili la Komunisma Partio de Hispanio kaj PODEMOS mem, kiun SUMAR anstataŭas.

Multajn aferojn oni diris pri la ĝisnuna politika etoso de Hispanio. Oni eĉ diris, ke la Reĝo mem ne povas ne proponi S-ron Sanĉeson, ĉar alimaniere li devus abdiki, dum aliaj diris, ke la Reĝo ja povas rifuzi tion, ĉar la leĝo ne diras al Li pri tio, kiujn

regulojn li devas obei por proponi kandidaton. Fakte, se oni rigardas la **Hispanan Konstitucion**, tie oni povas legi nur, ke la reĝo proponos kandidaton, kiun la Parlamento devas baloti. Kaj se pasas du monatojn sen favora balotado, oni devas ripeti la popolan balotadon. Sed Filipino 6^a hodiaŭ ne estis kuraĝa. Li sekvis tradicion neskribitan, kiu emigas lin proponi tion, kiun oni balotos verŝajne favore. Sed tiun favoron li devos pagi: **amnestion** por krimulo Puigdemont, kiu **puĉis** je 2017, kaj ankaŭ referendumon por sendependigi Katalunion kaj ankaŭ Vaskolandon en la estonto. Aliflanke, SUMAR postulas plialtigon de la bazan salajron por laboristoj, kaj aliaj aferoj. Entute, restos neniu loko por politiko socialisma.

Sed plej utilo por Hispanio estus, ke kaj PSOE kaj PP interkonsentos registaron por solvi la gravajn problemojn de Hispanio. Tion ŝajnas, ke Sanĉes ne volas. Li povos daŭrigi sian vivon kiel milionulon kaj fari tion, kion oni devigos lin fari.

Same kiel la hundeto de S-ro Edison, inventinto de gramofono: eĉ se li ne vidos el kie venas ĝi, li devas starigi siajn orelojn por aŭskulti la voĉon de sia mastro.

Aŭgusto Kaskero forpasis

Oni vivas atentante nur ĉitien kaj nunen, kaj oni diras, ke tio estas la taŭga afero fari.

Tamen, fojfoje forpasas geamikoj niaj, elstaraj esperantistoj, kiel

Ĝordano Moja, Jozefo Ludoviko Pérez Óvilo, plej kormola **Jozefo María Bernabéu...**,

kaj nun **Aŭgusto Kaskero.** Oni funebras ilin, kaj memoras pri tiu bono, kiun ili faris por Esperanto kaj por tiuj, kiuj vivis apud ili. Fojfoje oni forgesas erarojn, kaj asertigas agrablajn atingojn tiesajn.

Mi memoras, ke mi konis lindum la Kongreso de Valensjo je 1993^a, kiun li mem organizis. Estis tiu mia unua kongreso universala, kaj danke al li mi havis la ŝancon prelegi antaŭ centoj da homoj pri unu el miaj plej mirataj homoj: **Fernando Sors**, famega gitaristo hispana de la 19^a jarcento. Jarojn poste estis malbonfarto inter esperantistoj de ĉiparto de Hispanio kaj la centra oficejo de Madrido, kaj mi memoras, ke Aŭgusto

agis kiel bonkora peranto... Sed ni ne parolu pri tristaj



Foto pri kurso, kiun li gvidis en Ĉinio. Aŭgusto staras super la Stelo de Esperanto.

aferoj.

Aŭgusto Kaskero estis unu el tiuj homoj havindaj en nia Esperanto Movado. Li multe agis por Esperanto, ĉefe pri **instruado** de nia lingvo kaj kongresorganizado. Li ankaŭ estis **Prezidanto** de la **Hispana Esperanto Federacio** de 2005^a ĝis 2008^a kaj poste li ankaŭ estis Prezidanto de VEF, Valensja Esperanto Federacio.

Mi rifuzas kredi, ke li ne plu estas en Esperantio. Mi havas la konvinkon pri tio, ke li ankorau instruas kaj praktikas Esperanton en la Mondo Preterviva.

Saluton al Aŭgusto, La Ĉiama Esperantisto!

Kaj tamen diluvo ne venis!

Ne sukcesis via preferata politika partio, kaj ne estas granda katastrofo. La rezultinta registaro de la lasta balotado ja estas la registaro de ĉiu hispano, ne nur de ties balotantoj. Nun oni devas reiri en siajn aferojn.

Ĉar vere la registaro, ĉu tiu apogita de vi, ĉu de iu alia, ne solvos viajn problemojn. Tio okazas, ĉar deputitoj ne respondecas antaŭ vi, sed antaŭ tiu, kiu metis ilin en la koncernan liston de la partio. Fek' al ili!

Tamen, Hispanio estas multe pli ol tio, kion oni nun vidas. Ni ĉiuj estas Hispanio, certe, sed ankaŭ estas Hispanio la loko, kie ni ĉiuj naskiĝis kaj loĝas (kvankam ankaŭ tiuj, kiuj naskiĝinte aliloke venis ĉe ni kaj gajnis hispanan naciecon pro sia kontribuo al la nacio), kaj an-

kaŭ estas Hispanio tiuj, kiuj ankoraŭ ne naskiĝis ĉe ni, sed kiuj certe iam naskiĝos. Antaŭ tiuj, ni havas gravan respondecon lasi pli bonajn landon, ŝtaton kaj naciecon ol ni heredis kiam ni naskiĝis. Tio, kion ni ĉiuj faris, faras kaj ankoraŭ faros kun Hispanio estas grava respondeco antaŭ tiuj idoj kaj praidoj niaj, kiuj ankoraŭ venos. Tiel, ke ili ne plu povos kondamni nin dirante: *kion vi faris pri mia heredaĵo, paĉjo, panjo?*

Nun en Hispanio oni deziras nur vivi plej eble kiel bone, postulante rajtojn kaj privilegiojn, sen atenti al tio, ke ĉiu rajto havas sian koncernan devon, ĉiu privilegio sian antaŭprilaboron —ofte dura.

Niaj gepatroj donis al ni nacion pli gravan en la mondo ol tia, kian ni havas nun. Niaj geavoj




donis al niaj gepatroj nacion, kiu restariĝis post terura milito intercivitana. Kaj se oni retroiras malantaŭen en Historio, ni trovos la tempon —antaŭ duonjarmilo—, kiam Hispanio kovris la tutan mondon, ĉar estis hispanaj provincoj laŭ tuta kontinento amerika kaj diversaj lokoj de Oceanio. Sed poste, iom post iom, sinsekvaj generacioj da hispanoj lasis tion perdi pro korupteco —ĉefe— kaj manko da memrespekto kaj neracia miro pri eksterlando, ĉefe eŭropaj ŝtatoj, kiuj neniam ĉesis vundi nin kiel nacion kaj nacianojn, kaj same amerikaj ŝtatoj, kiujn ni provizis per niaj lingvo, religio, universitatoj, hospitaloj, ŝoseoj, eĉ gramatikoj de iliaj propraj indiĝenaj lingvoj, kiujn oni ne perdis, male al tio, kion britoj faris en Prausono. Pri ties krimoj, genocido kaj forrabo neniu ŝajnas memori nuntempe.

Kaj pri turpeco propra kaj troigo de eksterlando, ni perdis tion iom post iom: unue Napoleon' perfide invadis Hispanion, kaj ŝajnante helpi nin kontraŭ la francaj invadintoj, Anglujo detruis grandan riĉecon nian surloke dum la Milito Sendependiĝa je la 19^a jarcento. Dum tiu milito Simon' Bolivar kaj Jozefo Sanmartin' amikiĝis kun angloj, kaj post la sensukcesa atako de la angla floto kontraŭ Bonaero, britoj sukcesis aĉeti ambaŭ povsoi-

fantulojn, Bolivaron kaj Sanmartinon, tiel ke ili perfidis sian monarĥon kaj ankaŭ la nacion, kiu ebligis iliajn ekestojn mem, kaj post terura civila milito, la Amerika Hispanio sendependiĝis de Eŭropa Hispanio por ekdependiĝi de Britio kaj poste de Usono. Grava estas la doktrino de Prezidento usona Monroe: **Ameriko (=kontinento) por amerikanoj (=usonanoj)**. Tia pago por Pensakola!

Eble leganto ne familiara al historio de Hispanio surprizas pri tiuj asertoj, sed sciu, tio okazis pro tio, ke

la Konkero de Ameriko fare de hispanoj **ne estis koloniigo** laŭ la stilo de Britio, Nederlando, kaj eĉ Francio kaj —multe pli malfrue— Germanio: ne estis metropolo kaj kolonioj, sed **ĉiu lando de la hispanoj konkerita iĝis provinco** de Hispanio, kaj ties loĝantoj, tio estas, indiĝenoj, iĝis subuloj de la sama reĝo kun samaj rajtoj kiel tiuj homoj, kiuj naskiĝis en eŭropa Hispanio. Tio ja estas malfacile akceptebla, mi scias, de homoj, kiuj akceptas, ke blankuloj ekstermis indianojn en



Prezidento
Monroe de
Usono,
1817-1825

nuna Usono fare de britoj kaj usonanoj poste, kaj ankaŭ de la unuaj en Aŭstralio kaj aliaj landoj en la mondo, kaj ankaŭ normaliginte la kruelecon de britoj en Hindujo dum sia regado. Sed tiu diferenco estas facile komprenebla pro la filozofio de hispanoj kaj ceteraj konkerintoj: dum hispanoj konsideris, ke ĉiu homo estas filo de Dio kaj frato per Kristo, protestantoj tiutempe konsideris, ke indianoj estas bestoj, kiuj ne havas homrajtojn. Hispanoj konkeris nekonitajn landojn *por disvastigi la veran religion* de amo eĉ al malamiko, dum la motoro de la konkerintoj ceter-eŭropaj estis riĉecavido kaj ekspluato de novaj teritorioj kontraŭ rajtoj de ties enloĝantoj. Nuntempe oni penas *lavi* tiujn genocidojn kaj forrabojn per tiu nova koncepto, **prezentismo**, sed la agado de hispanoj tiutempe kaj tuj antaŭe senvalidigas tiun pretendon.

Ja, estis fakto, kiu malebligis hispanojn genocidi —kvankam ne portugalojn—: **Papo Aleksandro 6^a** komisiis konkerintojn sia agadoj **por kristianigi** kaj civilizigi la eblajn loĝantojn en landoj trovataj aliloke. Pro tio, ke ĉiu homo estas filo de Dio, hispanoj helpis ilin kleriĝi

kaj civilizigi, kaj la fakto, ke portugaloj ne faris same estas mistero por mi hodiaŭ, kvanam estas kompreneble, ke malbonaj kristanoj ne ekzistas nur nun, sed tiutempe ankaŭ. Se oni vidas la mapon de la konkerintoj portugaloj kaj hispanoj, oni notas, ke dum Portugalio koloniigis nur maldikajn pecojn da tero laŭ la marbordo, hispanoj konkeris dikajn pecojn, de maro al maro, laŭ la tuta kontinento, de la suda pinto al Alasko, inkluzivante 60% de nuna Usono.

Fama indiano **Gerónimo** parolis la hispanan lingvon, estis katolika kaj oni povas ankoraŭ vidi fotojn de li kun rosario ĉirkaŭ lia kolo.



Fama apaĉa Heronimo mortis 83jaraĝa vidante sian popolon detruita pro avido genocida de meksikanoj kaj usonanoj, kiuj neniam respektis la rajtojn, kiuj hispanoj donis al indianoj jarcentojn antaŭe.

Bedaŭrinde por indiĝenoj, angloj ne pensis simile: kiam ili ne plu estis katolikaj, sed sektiĝis protestante kiel anglikanoj, ili diris, ke Papo de Romo ne havas jurisdicion sur ili, kaj ili decidis iri en Amerikon, ankaŭ, eĉ se ili evitis la lokojn jam konkeritajn de portugaloj kaj hispanoj, do ili kreis la 13 koloniojn nordoriente de la kontinento, kiuj siatempe, pro tio, ke la Brita Parlamento ne atentis al

ili kaj ne donis al ili reprezentecan, decidis sendependiĝi.


La Amerika Hispanio ne havis tiun kialon, ĉar indiĝenoj havis sian **Consejo de Indias** (konsilantaro de Indianlando), kaj ankaŭ hispanaj vicreĝoj kaj aliaj povaj funkciuloj en Ameriko devis suferi **Juĝon da Residenco** kiam ili ĉesis en sia posteno, dum kiu ĉiu homo, ĉu indiano ĉu eŭropdevena, povis akuzi lin pro iu ajn afero, kaj se jurio trovis lin kulpa, li suferos karceron, aŭ punon, ĉu mona, eĉ mortopunon. Estas logike pensi, ke se britoj havintus similan leĝon, ili ne povintus genocidi milionojn da indianoj, kion ili fakte faris. Ankoraŭ je la 20^a jarcento, kiam mi komentis al pensilvanano pri tiu genocido, li fiere krietis *Jes, ni forbalais ilin, indianojn!* Kio ja estas terure, ĉu ne? La memdifinita lando de libereco ne agnoskis rajtojn al indianoj kaj nigruloj, ĝis post la duono de la lasta jarcento! Kvincent jarojn post kiam la hispanoj tion faris.

Bedaŭrinde, ili mem difinis sin kiel **misionistoj de Dio**, kaj diris, ke *sia misio estas koloniigi la landon tiutempe okupata de bestoj, kiuj similas homojn, indianoj*. Kaj agis sekve: ili diris, ke *la plej bona indiano estas la mortinta indiano*, kaj ili uzis ĉiun rimedon mortigi ilin pere de maljustaj militoj kaj

aliaj troigoj, tiel ke la indianoj restantaj hodiaŭ loĝas en rezervujoj. Mi mem aŭdis usonanon plendi antaŭ kelkaj jardekoj, ke estas skandalo, ke la registaro de Usono devas pagi al indianoj pensionojn! La fakto, ke nuna Usono forrabis la landon al ĝiaj originaj loĝantoj neniam venis en lian kapon...

Tio ne okazintus, ververe, se Hispanio povintus konkeri la tutan kontinenton antaŭ ol britoj aperis en Nordameriko, sed oni devas miri, ke tiun prodaĵon, konkeri plej grandan parton de tuta kontinento, faris nur kelkaj dekoj da miloj da homoj de unu nacio, Hispanio, kiu popolis tiutempe nur 5 milionoj da homoj.

Kaj hodiaŭ multaj homoj en Sudameriko honeste kredas, ke Hispanio forrabis ties riĉecojn kaj mortigis *iliajn pragepatrojn*, senrigardante la evidentan fakton, ke se tiu estus vera, neniu indiandevna homo ekzistus hodiaŭ. Fakte tiuj, kiuj rabis kaj murdis indianojn en Sudameriko estis la ankoraŭ nomataj **liberigantoj**, Bolívar kaj Sanmartin' kaj ties sekvantoj, ĉar fakte indianoj luktis en la flanko volante resti Hispanio, ĉar la hispana reĝo ne povis sendi armeon protekti tiujn provincojn, ĉar hispanoj eŭropaj estis okupataj forpuŝante francojn napoleonajn tiam. Kaj ankaŭ ili, indi-



Jozefo de Sanmartin', perfidulo al Hispanio kaj al Sudameriko.

anoj, timis, ke kiam ili ne plu estos hispanoj, ili ne estos civitanoj normalaj, kio fakte okazis tuj post sendependiĝo.


Tiel, perdante hispanecon, Sudameriko perdis dececon kaj homsentojn, ĉar novaj sudamerikanoj de arterfaritaj nacioj mortigis milojn da indianojn, kaj nun laste oni agnoskis ties rajtojn, sed registaron sudamerikajn nunajn ne kompenzis restantajn indianojn pro tio, same kiel Usono ankoraŭ ne faris.

En Usono la unua interrasa geedziĝo ne estis laŭleĝa ĝis 1964^a, kvin jarcentojn post tio, kio okazis

en Sudameriko, kiam ĝi estis Hispanio.

Kaj nun multe da homoj laŭ la mondo kaj —kio estas pli vundige— en Hispanio kredas ke hispanoj faris la samajn krimojn kaj amasmurdaĵon, kiujn britoj, nederlandanoj kaj francoj faris en Ameriko kaj Afriko. Sed oni memdemandu kiam ekstariĝis la unua usona universitato —kelkajn jarcentojn post tiu de Meksiko (kiam ĝi nomiĝis Novhispanio), ekzemple—, kaj kiom da universitatoj, hospitaloj kaj ŝoseoj faris britoj kaj ceteraj eŭropanoj en tiuj landoj, kiujn ili konkeris kaj ekspluatis.

Oni povas sindemandi, kial la rolo de Hispanio en la mondo hodiaŭ estas tiom diskreta, tute ne staranta, se hispanoj ĉiam preferis interkonsento al milito, sed la respondo estas, laŭ mi en la politika klaso: Hispanio estas nobla popolo regata de mizeraj gvidantoj. Ni vidas hodiaŭ, ke prezidento Sánchez celas barakti kun krimulo Puĝdemont' interkonsento por konservi sian postenon, klare kontraŭ la intereso de hispanoj. Kaj tion ne kritikis multaj hispanoj. Ili



Simon' Bolivar, genocidulo.

Lavita de Ugo Çavez

kredas, ke Sánchez faras ion por nia intereso, anstataŭ por tiu sia kaj nur sia. Aliflanke staras aliaj hispanoj, kiuj vere timas respublikon.

Ili ne volas, ke respubliko venu en Hispanion. Ververe nia historio ne parolas tre brile pri la du memdifinitaj respublikoj hispanaj. La unua tute ne funkciis, kaj kelkaj partoj de Hispanio emis sendependiĝi dum la unua. La dua forrabis civilajn rajtojn al disidentoj pro tio, ke ili estis dekstremaj aŭ tute ne revoluciaj. Multaj murdoj okazis dum la Dua Respubliko sen tio, ke la Registaro persekutas la murdistojn, kaj sekve militistoj devis stari kontraŭ la manko da ĵuro en la hispana socio.

La maldekstra diktatoreco malvenkis la militon, kaj dum kelkaj jaroj poste ili sendis armitajn bandojn nomumitajn kiel **makis'** murdi selektivajn celojn, sed la Civilgvardio finis ilin surloke kaj ankaŭ la Komunisma Partio de Hispanio ĉesis apogi ilin pro politikaj kialoj. Kaj pro tio, ke ili malvenkis kaj milite kaj socie —la hispana popolo jam havis sufiĉe da malpaco— ili plendas de tiam, ke ili havas moralan superecon, ĉar ili malvenkis militon antaŭ brutaro, kiu ne estas progresiva kaj liberecdefenda, kiel ili mem plendas, ke ili

estas.

Bedaŭrinde por ili, ĉie en la mondo, kie komunismo sukcesis, libereco mankas, kaj ankaŭ ekonomia bonfarto kaj progresoj sociala, scienca aŭ homrajta. Kaj tio senvalidigas tiu mempropagando pri tio, ke ili estas progresismaj kaj defendas rajtoj de laboristoj. Necesas esti blinda por ne vidi tion. Bedaŭrinde, al Hispanio malmankas blinduloj...

Nuntempe ni havas konstitucian monarĥion en Hispanio, kiu garantiis preskaŭ perfektan pacon dum 45 jaroj. Ĉu tio signifas, ke monarĥio estas nia plej bona politika sistemo? Nu, laŭ mi plibonas..., respubliko! Sed ne maldekstra respubliko, sed ĉies respubliko.

Atingi tiun celon necesas, ke oni havos konstituantan balotadon por elekti deputitaron, kiu prilaboros novan konstitucion kie civitanoj, ne partioj politikaj, havos la povon. Sekve, mi pledas por Konstitucia Respubliko.

**Vivu respubliko
konstitucia!**

Beletro

Kelkaj rimarkoj pri Don' Hŭan' Tenorjo

L iteraturo pri viro senhono-
 rigrante virinon ne mankas
 en nia lingvo kaj aliaj. Estas
 tradicio pri tio, kvazaŭ militoj
 inter seksoj, kaj estas verkoj
 kiel tiuj de britoj Tomas' Hej-
 ŭud, *Virino mortigita per
 afableco*, aŭ Vilhelmo Ŝeks-
 piir, *Dresado de virinaĉo*;
 ne forgesante la verkon de
 hispano Tirso de Molina *La
 trompisto de Seviljo*, aŭ
*Dom Juan, aŭ la festuma-
 do de Petro*, de franco
 Moljer'.

Tiun lastan verkon uzis W. A.
 Mozart por komponi sian fame-
 gan operon, *Don Giovanni* (S-ro
 Johano), je kies fino homo, kiu
 ĉiam agadis kiel vera demono
 iris en inferon kune kun sia
 preskaŭ bopatro, restante la ra-
 konto averto al junuloj pri kien
 irigas perversa vivo kaj diboĉa
 konduto.

Je la 19^a jarcento juna **José Zo-
 rrilla y Moral** (Jozefo Vulpineto
 kaj Moral') estis mendita novan
 teatraĵon, kaj post nur 20 tagoj, li
 produktis sian plej faman ver-
 kon, unu el la nesenhavajn lega-
 dojn en la hispana lingvo, eble la
 plej faman teatraĵon en tiu ling-
 vo, *Don Juan Tenorio* (S-ro Joha-
 no, kiu tenas). Ĝi premieris en
 Teatro de la Cruz (de la kruco) la

28^{an} de marto de 1844 kun ne
 multe da sukceso eble ĉar la
 geaktoroj estis tro maljunaj por
 tiuj roloj, Carlos Latorre kaj Bár-
 bara Lamadrid, kaj la sceno
 mem ne estis tre altkvalita.
 Tamen, kelkajn tagojn poste, en
 la ĵurnalo *La Laberinto*, oni ana-
 lizis per artikolo la tekston de la
 teatraĵo, kaj notigis, ke ĝi estis
 altkvalite poezia, kaj la dramo
 estis tre efektiva laŭ la sinsekvaj
 situacioj, kiuj aperis en la verko:
 dueloj, mortigado, defioj, blas-
 femado, satana penetrado en
 monaĥinejon..., nome ĉio, kion
 oni povus esperi de diablo. Tio
 emigis homojn viziti denove tea-
 tron kaj komencis la grandan
 sukceson de tiu teatraĵo, kiu
 daŭrigas ĝis hodiaŭ.

Je 1934^a Cecilio Pineda kaj ties
 trupo reprezentis la teatraĵon en
 Teatro Romea, de Mursjo, rice-
 vante grandan sukceson, kaj du
 jarojn poste, la sukceso ripetiĝis,
 kaj de tiam la teatraĵon oni ludas
 en tiu ĉi Teatro Romea je *la nokto
 de animoj*, tio estas, la nokton
 antaŭ la Tago de Ĉiuj Sanktuloj,
 la 31^{an} de oktobro. De tiam ĉiun
 jaron oni ludis la teatraĵon ĝis la
 jaroj 1960^a, ĉar tiu familio Pineda
 heredis de gepatroj al gefiloj la
 intereso por aktorado.

Je la jaro 1980^a, tiama urbestro
 Rafael Méndez proponis al nepo

Don Huan Tenorio

Jozefo Vulpineto



Fotita de
**MARÍA
CELDRÁN**

de la fondinto de la aktora dinastio, daŭrigi tiun interesan mursjan tradicion, kaj denove ni havis la teatraĵon en nia urbo

semajnon antaŭ la 1^a de novembro.

Sur tiuj fotoj oni povas vidi

La libro, kiun vi havas sur viaj manoj sekvas la procedon de muntaĵo kaj reprezentado de Don' Ĥuan Tenorjo ĉe Teatro Romea de Mursjo. La trupo de Cecilio Pineda unuigis la tekston de Zorrilla (Vulpineto, esperante) per bonega kolekto de fotoj de María Celdrán, kiu montras klare la emon klasikan de la enscenejado. Sufiĉas observi la teĥnikajn slipojn de aktorado, de tiu 1989^a, kiam oni reakiris la Tenorjon en la urbo de Mursjo, por noti la pentritan dekoradon, vestaron provizita de bona entrepreno madrida tiufaka, plus zorgado pri detaloj, kiuj estas signo de identigo de ĉi tiu trupo. Ni parolas pri Tenorjo reprezentata je la klasika maniero, kaj pri detaloj scenaj, kaj pri la maniero aktori. El tio venas ĉarmo enhavata, kion ratifikas la multnombra publiko, kiu jaron post jaro amaseplenigas Teatron Romean.

CÉSAR OLIVA

*Se oni ne povas
vidi la teatraĵon, oni
almenaŭ povas
aĉeti la libron kun
la hispana teksto
de José Zorrilla
kaj la fotoj de
María Celdrán.*



diversajn bildojn rolitajn de la pranepo de Cecilio Pineda kaj ties trupo, Julio Navarro Albero. Se oni amas teatron, oni povos

ĝui la verkon de la 27^a de oktobro ĝis la 1^a de novembro en Teatro Romea de Mursjo.

Beletro

Fulmo neĉesanta

La urbodoma registaro de Madrido decidis laste forvisi la versojn de nia poeto Miguel Hernández de la cemetario de La Almudeno. Laŭ mi tiu arbitracia decido estas kontraŭkultura kaj maloportuna, kaj sekve mi decidis eternigi ilin ĉe la paĝoj de nia **Kajeroj el la Sudo**.

La forprenitaj versoj estas jenaj: **Elegio (fragmento)**

*Al mia ĝardeno kaj figarbo
per l' alta skafald' de floroj
revenos ci,
kaj birdos via abelhejma
anim'
per anĝela vaks' kaj labor'.*

*Revenos al krada lulkant'
de enamiĝintaj
gekampanuloj ci.
Kaj heligos la ombron de
miaj brovoj ci,
kaj cia sango iros ĉiuflanke
disputante vian amatinon
kaj la abelojn.
Via koro, jam eluzita
veluro,
voku kampon de brilantaj
migdaloj
mia avida voĉo de amo.
Al la flugilhavaj animoj de
la rozoj
de la migdalarbo de kremo
mi postulas vin,
ke ni devas paroli pri
multaj aferoj,
anima geamiko, kunulo*

Elegía (fragmento)

*[Volverás a mi huerto y a mi
higuera
por los altos andamios de las
flores
pajareará tu alma colmenera
de angelicales ceras y
labores.
Volverás al arrullo de las
rejas
de los enamorados
labradores.
Alegrarás la sombra de mis
cejas,
y tu sangre se irán a cada
lado
disputando tu novia y las
abejas.
Tu corazón, ya terciopelo
ajado,
llama a un campo de
almendras espumosas
mi avariciosa voz de
enamorado.
A las aladas almas de las
rosas
del almendro de nata te
requiero,
que tenemos que hablar de
muchas cosas,
compañero del alma,
compañero.*



Malbona negoco

Jen rakonto, kiu troviĝas en mia verko *La libro de anĝelaj kronikoj kaj demonaj anekdotoj*, kiun oni povas senpage legi ĉe <http://www.obracompleta.com/eo/kronikoj.html>

Ĉi tiu estas rakonto pri pereoj. Ŝipoj estis dum multaj jarcentoj la sola perilo transiri la maron por komerci, trovi pli bonan vivon, aŭ eĉ nur distri sin. Sed iom post iom multajn el tiuj aferoj, ĉefe la lasta, oni ne plu faras per maro, kaj aviadiloj anstataŭis ŝipojn, ĉar ili estas pli rapidaj, komfortaj kaj malmultekostaj. Sed ankoraŭ restas homoj, kiuj havas monon kaj tempon, kaj aldone kelke da aventura spirito, kaj ili ankoraŭ trovas plezuron navigi per longaj krosoj, pro sia emo koni novajn landojn, aŭ almenaŭ sperti subfleksigon pozitivan kaj negativan, tio estas, tiun movon, kiun ŝipoj havas fleksiĝante pro puŝo de ondoj kun diversaj fortoj je siaj ekstremaj kaj meza partoj. Tio okazigas movon specialan al tiuj, kiuj, kiel Eŭstakjo, ŝatas legi kuŝante sur sia ŝiplito, sub taglumo, kiu envenas lian kajuton pere de rondfenestreto. Tie li izoliĝis el ŝipaj bruoj, pere de subsinmetiĝo en legadon.

Sed la trian tagon de lia kroso al Novjorko subite li levis sian rigardon el sia libro, neaparta verko de Emilio Salgari, *Malbenata ŝipo*, kiu rakontas la travivaĵojn de Papa Catreme. Tiom absorbita li estis en legado, ke kiam li finis legi, li pensadis pri ĝi..., ĝis kiam li subite konsciiĝis pri tio, ke li ne plu aŭdas la bruon de la motoro de la ŝipo, kaj ankaŭ de aliaj homoj. Li aŭdas nenion ajn! Li ekstaris per salto, lasante la libron sur la lito. Li vestiĝis rapide kaj eliris la kajuton. Li trovis neniun surŝipe. La ferdeko klinis iomete maldekstren. Li venis al rando kaj vidis fore aron da boatoj kun homoj ene. Li turniĝis al la loko, kie li vidis ilin pendi

kelkajn tagojn antaŭe: estis nenio tie. Kiel eblas, ke oni sukcesis forlasi la ŝipon sen tio, ke li konstatas? Ĉu homoj ne kriis, ploris..? Jes, li estis kun Emilio Salgari, ekzakte kun Papa Catreme, kiu rakontis al li pri sirenoj kaj malaperintoj en la maro. Eble oni laŭtkriis, kaj li ne aŭdis ilin en sia kajuto, tute izolita el ekstera mondo, absorbita en sia legado. Nun li kredas memori, ke li aŭdis la ŝipsirenon, sed li kredis, ke temas pri imagopovo sia. La ŝipo nun klinas pli: dudek gradojn baborde. Li rigardis, senhelpa, kaj trovis nenion, eĉ ne unu boateton, eĉ simplan savringon.

Ĵusmortonta estas mi, li diris al si mem. Li malbonfartis pro tio, ke li ne konstatis, ke du mil homoj forlasis la ŝipon. Al neniun mankis li. Li ĉiam vivis sola. Nur kun siaj fikciaj roluloj. *Ili vere ne ĝenas min*, li pensas. Kaj li rigardis la proksimiĝantan maron. Subite la ŝipo klinis malantaŭen, levigante sian pruan al ĉielo, kaj tiam okazis surpriza afero: la ŝipo, tute vertikala, komencis submariĝi, sed subite ĝi haltis. Li premas la gardrelon kaj preskaŭ pendas el ĝi dum seĝoj kaj aliaj objektoj ne fiksitaj al planko jam falis en maron aŭ la internon de la ŝipo, sed ĝi haltis en sia vojaĝo al profundo, kaj nun, ĉar pli da akvo venis en la internon, ĝi denove prenis horizontalon, malrapide. Tiam li vidis ĝin: ŝarko naĝas kelkcentmetrojn for de la ŝipo. Ŝajnis, ke ĝi venas al rendevuo.

Almenaŭ mi ne mortos malrapide, li diris al si. Nun li jam povas stari denove.

—Kion vi donos ne morti?, —li aŭdis el klara, laŭta voĉo.

Li turniĝis. Tie, nur unu metro for de li, estis malalta viro, senhara, kun melonĉapelo.

—Ĉion, kion mi havas.

- Mi nur prenos vian animon.
- Ĉu mia animo? Por kio volas vi animon mian?
- Ĉar mi kolektas animojn. Se vi donas al mi vian animon, mi savos vin.
- Konsentite. Mi neniam uzis mian animon por io ajn. Via estu, se vi savos min.
- Ne tiom rapide. Iru vi al suba ferdeko. Tie vi vidis boateton, kiun maristoj uzis fiŝi kiam ili estis havene. Ne estas vere savboato, kaj ene de la katastrofa bruado, neniun pensis pri ĝi.

Vere, tie estis la boateto. Sed ĝi estis tro peza, por ke li povus porti sur la akvon.

- Ne paniku, —asertis la hometo kvazaŭ li legis lian penson. —Malkonektigu ĝin el la ligoj, kiujn ĝi havas. Uzu la hakilon, kiu estas sur tiu muro, ĉar vi ne havas multe da tempo, kaj eniru la boateton.

Tiel faris Eŭstakjo, kaj li vidis, ke post kelkaj minutoj la maro supreniras iom post iom ĝis kiam ĝi atingis la ferdekon, kie li estas, kaj lante la boateto flotas supren kaj supren.

- Nun vi remu al suno, ĉiam al suno, ĉar malmankas al vi malmulte da tempo.
- Ĉu vi ne venas?
- Ne. Mi restos ĉi tie preni ĉion, kion mi povos. Sed ne zorgu, ulo. Mi ne dronos. Vi remu ĉiam al suno. Vi trovos insuleton tri mejlojn for de ĉi tie.

Kaj li ne plu sciis pri la hometo. Li laboris per la remiloj dure, ĝis kiam li vidis sin preter la loko, kie li vidis ŝarkon. Li malproksimiĝis el ŝipo sen perdi ĝin el lia alrigardo. Oni diris la li, ke kiam ŝipo submariĝas, ĝi povas kapti proksimajn objektojn, kiel lian boateton, kaj suĉi ilin suben. Sed la

